



Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA D E T

N-ro 9/10
1964

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
CEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
30-a (37-a) jaro
Monata

Marie Wexelsen:

Kristnaska infankanto

(NORVEGA HIMNARO, n-ro 852)

*Mi ĝojas en la kristnaskvesper',
naskiĝis tiam Savant',
brulegis stelo sur la ĉiel',
aŭdiĝis la anĝel-kant'.*

*Infano tiam en Betleĥem'
ja estis reĝ' de ĉiel',
kaj Li alvenis al nia ter'
el la ĉiela kastel'.*

*Nun ree loĝas Li en ĉiel',
Li estas Filo de Di',
sed al la preĝoj de l' infanet'
atentas ĉiam Li.*

*Mi ĝojas en la kristnaskvesper',
kaj laŭde kantas en kor',
ĉar paradizon al infanet'
malfermas nia Sinjor'.*

*Lumigas mia patrino nun
per viva flam' de kandel',
ŝi diras: Tiel ekflamis ja
la bela kristnaskostel'.*

*Ŝi diras: Ĉiam briladas stel',
mallum' ne estas en ĝi,
kaj se ĝi brilas sur mia voj',
ĝi gvidas rekte al Di'.*



*Ŝi diras, ke la anĝela kant'
hodiaŭ sonas pri pac',
pri ĝojo al nia tuta ter',
pri Dia amo kaj grac'.*

*Ho, se Lin povus per mia kant'
laŭdegi mi, la infan',
Jesuo ĝojus, ĉar Lia mi
fariĝis per baptoban'.*

*Jesuon amas mi, tial mi
ĝojegas en kristvesper',
ke Li min amas per tuta kor',
mi scias, estas la ver'.*

Trad.: Hans Amund Rosbach
(el «Dia Regno» 12/1962)

Sub la peko

Dagfinn Zwiilmeyer

Sklave mi sub peko tretas,
ligas min la forta ĉen'!
Dorme mi la kapon metas
al malmola ŝton-kusen'.
Mia vojo ŝajnas kruta,
malprofunda mia puto.
Mi soifas je la guto
el la fonto de la ben'.

Krucon Vi al ŝarĝo donas,
nun vundiĝis laca krur'.
Sed batalon Vian konas
mi — mi iom lernu nur.
La fremdlando min disŝiras,
al senvojo nun mi iras.
Al adopto mi sopiras,
al dieca la natur'.

Mi batalis por la savo,
duboplana, sen esper';
restis sub kolero sklavo,
vana estis viv' sur ter'.
Mia gajno estas nulo
— des pli grandas la postulo!
Ho, Sinjoro, Vi graculo:
Venu, savu el mizer'!

Trad.: Hans Amund Rosbach

Aktuale antaŭ Hamar:

Lingvo internacia kaj abstinaj fervojistoj

Inter fervojistoj funkcias internacia ligo por kontraŭbatali alkoholon en nuntempa granda kaj rapida trafiko.

La ligo (Internationaler Eisenbahn Alkoholgegner Verband - IEAV) havas ĉ. 75 000 membrojn en eŭropaj landoj. La ĉefstabo estas en Svisio. La oficialaj lingvoj en la ligo estas ĉefe la germana, sed ankaŭ la franca kaj angla lingvoj. Speciale nordaj

membroj havas lingvajn malfacilaĵojn. Tial la finna, sveda, norvega kaj dana membraj societoj proponis, ke ankaŭ la internacia lingvo Esperanto estu unu oficiala lingvo en internaciaj kunvenoj.

La propono ne atingis praktikajn rezultojn. Speciale reprezentantoj de la germana lingva teritorio (el okcidenta Germanio, Svisio, Aŭstrio kaj ankaŭ el Nederlando) kontraŭstaris la proponon.

La kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto Federacio estos en Norvegujo en majo 1965. Mi volonte planos post la kongreso en Norvegujo vojaĝon en Finnlando por abstinaj fervojistoj, kiuj volas konatiĝi kun finnaj samideanoj kaj vidi nian hejmlandon. En la jaro 1967 okazos la internacia kongreso de la abstinaj fervojistoj en Finnlando.

Matti Voltti

Korespondu!

39-jara poŝtistino interesigas pri turismo, poŝtmarkoj kaj vidaĵkartoj. Ŝatas studi fremdajn lingvojn! Mia adreso: Helena Hrudková, Zvolen, Krupinská cesta 1157, Ĉeĥoslovakio. Mia 15-jara filino: Dagmar Francesca Hrudková: adreso sama.

S.ro Svoboda, Rudolf, Ostrava — Hrabuvka, Hasičská 46, Domov 2, Ĉeĥoslovakio — CSSR, kaj 15 kamaŝadoj, volos korespondos kun junaj ge-samideanoj de 15—30 jarojn. Niaj intereso estas: gimnastiko, kolekti insignojn kaj vidaĵojn el fremdaj urboj. Ni ankaŭ estas filatelistoj.

14-jara pola knabino dez. kor. kun norvega samaĝulino. Interesiĝas pri literaturo kaj desegnado. Małgorzata Jankowska, ul. Berczynska 42—14, Warszawa, poŝto 33, Pollando.

(daŭr. p. 115)

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo
Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—
1/8 p. kr. 19,—.

Antaŭ la ferioj

Ni havas ĉiuj tro multajn farotaĵojn — farenadaĵojn.

Dum la ferioj ni faros ion alian. Ni legos librojn, kiujn ni ĝis tiam ne havis tempon tuŝi. Ni legos Esperantan libron — ĵus aĉetitan, estas ja Librotago en decembro.

Kaj ni ripozos. Ni parolos kun la infanoj. Ni ludos pianon. Ni aŭskultos al la radio. Ni rigardos televidajn programojn. Ni vizitos kinejon. Ni vizitos amikojn. Ni promenos. Ni faros ĉion, por kio ni ordinare ne havas tempon.

Eble ni ankaŭ ludos ŝakon. Aŭ solvos krucvortenigmon! En ĉi tiu n-ro de nia gazeto ni prezentas novan krucvortenigmon. Cetere aperas ankaŭ alia konkurso kaj malgranda demandaro.

Multe da plezuro!

Kaj bonan kristnaskon! Kun meritita ripozo kaj ĝojo!



Jubileo

La 11-an de septembro Stavanger Esperantoklubb povas festi sian 15-jaran jubileon.

Sciigoj de N.E.L.

Kursoj. Jam estas tempo plani la kursojn dum la venonta printempa sezono. Klubo, kiuj ne aranĝis kursojn dum la ĵus pasinta aŭtuno, devas nepre aranĝi almenaŭ unu kurson dum la printempo. — Sen kursoj neniu progreso. Kaj ĉiuj kluboj devas progresi!

Korespondaj kursoj. Notu bone ke membro, kiu varbas kursanon por la koresponda kurso (parto I aŭ ambaŭ partoj kune), rajtas depreni varbpremion de kr. 5,00 kiam li sendas la mendon. Prez-oj: Parto I: kr. 23,00; parto II: kr. 25,00; ambaŭ partoj kune: kr. 42,00. Por ano de studrondo de minimume 5 anoj la prezoj estas: kr. 17,00, kr. 19,00, kr. 32,00.

Prelegoj. Se vi faras prelegon pri Esp.o, bonvolu nepre sendi raporton al NEL. Blankedojn por tiaj raportoj ni sendas je peto.

Taskotabelo por la kluboj — Decembro: La estraro ripetas la admonon al la membroj pagi kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto daŭrigas la enkasigadon de tiuj kotizoj. La Delegito de UEA daŭrigas la kolektadon de UEA-kotizoj por la venonta jaro kaj la varbadon de novaj Individuaj Membroj de UEA. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo.

Januaro: La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkulraporton kaj bilancon. La revizoroj kontrolas ke la kasisto faras tion, kaj postulas

la kaslibrojn por revizio. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato, kaj ĝenerale la printempan agadon, kaj pri-traktas la jarraporton, kalkularaporton kaj bilancon, multobligas ilin kaj sendas kun la skriba kunvoko pri ĝenerala kunveno al ĉiuj klubanoj. Tuj post la ĝenerala kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A 9) al NEL kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15-a la sekretario sendas raporton pri la 4-a jarkvarono kaj studraporton pri la 2-a jarduono de la pasinta jaro (bl. A 10/E 1) al NEL kaj al la Distrikto. La Komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj pagon por venditaj libroj al la Eldonejo. La raportanto sendas raporton pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al NEL kaj al la Distrikto.

La Liga Estraro.

Esperanto-stratoj en Norvegujo

La urbeŝtaro de Elverum jam printempe decidis doni al unu strato estos inaŭgurata dum la fervojista kongreso en Hamar en majo 1965.

Ni ĵus ricevis informon de Trygve Müller, Jørpeland, ke li atingis samantan sukceson: la komunuma estraro de Jørpeland decidis doni al la vojo, en kiu loĝas Müller, la nomon Esperantovegen. La vojo estis inaŭgurata en la fino de novembro 1964.

Do, Elverum estis la unua loko en Norvegujo, kiu decidis Esperantostraton, sed Jørpeland estos tamen la unua loko, kiu efektivigos la samon!

Kiu estos la tria norvega loko aŭ urbo kun Esperanto-strato?

Frits Lindén mortis.

En la aĝo de 71 jaroj mortis nia sveda samideano, lektoro Frits Lindén, la aŭtoro de pluraj lernolibroj, i. a. la bonega «Esperantokurs».

SE . . .

16 DEMANDOJ

1. Se vi trovis *konvolvulon*, ĉu vi havas beston, floron aŭ ŝtonon?
2. Se vi estas en nordeŭropa lando sen fervojoj, kie vi estas?
3. Se vi renkontas *eskadronon*, ĉu vi estas surmare aŭ surtere?
4. Se vi aŭdas pri besto kun 50 000 okuloj, kiu besto estas ĝi?
5. Se vi trovas *granaton*, kion vi devus fari?
6. Se iu montras al vi ion, dirante, ke ĝi estas *piŝto*, ĉu vi povas diri, de kio ĝi estas parto?
7. Se vi vidas palacon konstruitan sur 13 659 fostoĵoj, kie vi estas?
8. Se vi havas *skarlatinon*, kion vi devus fari?
9. Se vi vizitas urbon kun 1450 temploj kaj 570 moskeoj, kie vi troviĝas?
10. Se oni regalis vin per kuko, kukolo, kukumo kaj kukurbo, — kiu el tiuj manĝoj estas nemanĝebla?
11. Se vi aŭdas iun krei: «Du trefoj!» — ĉu vi scias, kion li faras?
12. Se vi volas viziti la plej alte situantan kaj la plej malalte situantan urbojn en la mondo, kien vi devas vojaĝi?
13. Se vi *riglas*, kion vi tiam faras?
14. Se vi aŭdas pri planedo, kiu bezonas 248 jaroj por sia rondiro ĉirkaŭ la suno, kiu planedo estas tiu?
15. Se vi *lutas*, kion vi tiam faras?
16. Se *forfikulo* venas en vian domon, kian akcepton vi donus?

(Respondoj p. 115)

JUBILEO

Novelo de Willy Breinholst

Mi ĉiam estis fuŝulo, kiam koncernis rememori geedziĝajn tagojn, naskiĝtagojn k.t.p. Ja, tio estas, ĝenerale mi memoras la datrevenon de mia propra naskiĝtago. Sed kiam koncernas nian geedziĝan tagon, do la daton de ĉi tiu okazintaĵo, iom post iom pasis tiom longa tempo, ke mi entute nur memoras, ke mi estis inter la ĉeestantoj.

Marianne memoras ĉion tian tiel akurate, ke oni povus kredi ke ŝi estus ekipita de duoble funkcia elektra cerbo — ŝi scias, kiam tiuj de Thomasen festos arĝentan geedziĝofeston. Ŝi memoras parkere la naskiĝtagojn de onklino Olga, nevo Peder kaj nevino Alice, kaj ŝi memoras la daton kaj la tagon, kiam nia geavoj festis la diamantan geedziĝan jubileon.

Sed mi riskas aserti, ke ŝi ne scias, kiam Kolumbo trovis Amerikon. Oni facile povas kredi ĝin, ke tio okazis en 1864 — aŭ eĉ en 1914.

Mi ĉiam timiĝas iomete, kiam ŝi aperas iom pli ornamita kaj iom pli bonhumora ol ordinare.

Ĉar tio estas certa antaŭsigno, ke estas aŭ ŝia naskiĝtago, la datreveno de nia geedziĝo aŭ io ajn simila. Kaj jen oni sidas tie kun la ĵurnalo, maĉante unu bulkon post la alia, sen ekmemori, kio diable estas.

Aŭ kiel nun freŝdate, kiam mi laca kaj eluzita revenis hejmen de la taga laboro kaj peze enfalis en la apogseĝon — sen entute rimarki, ke surtable troviĝas torto.

Estis nur kiam mi sidiĝis ĉe la blanktukita tablo etendante la manon por kapti la akvokarafonon, ke mi ekvidis tion: Estis ankaŭ vinglasoj kaj kandeloj!

Marianne aspektis tre solena, kiam

ŝi enverŝis la ŝereon en mian glason.

Mi freneze pensis por eltrovi, kio povas esti, kion ni tiel fortege festus.

La datreveno de mia naskiĝdato ne estis, mi povis ĵuri pri tio. Estis ne pli ol semajno de kiam mi fariĝis 40-jara. Aŭ ĉu 39-jara? Verŝajne estis 41-jara. Bone, ne konsiderante tion, mi ĉiukaze trovos tion sur mia atesto pri bapto.

Nek estis la naskiĝtago de Marianne. Ŝi entute nenion ajn festas je ĉi tiu sezono. Aŭ ĉu ŝi tamen faris? Ĉu estas onklino Olga, kiu festos naskiĝan tagon oktobre? Estas ĉiukaze iu, kiu festas naskiĝan tagon en nia aŭtuna ferio. Nun mi tion memoras — estas mi mem! Dio scias, kiu do estis, kiu festis naskiĝan tagon antaŭ semajno?

Mi levis la glason dirante: je via sano — sen renkonti la rigardon de Marianne. — Cetere mi gratulas! mi aldonis por eviti dubon.

— Pro kio? ŝi demandis inkvizicie.

Tie ŝi min kaptis. Mi iris rekte en la insidon.

— Ĉu ne estas — mi murmuris, — ĉu ne estas via naskiĝtago? Senŝenĉaĵo — tiu de onklino Theodoro — tiu de nepino Olga, mi volas diri.

— Ne, ŝi respondis, formetante la glason firme.

— Nun mi ekmemoras! mi sencele provis, — estas nia kupra geedziĝtago! Pensu, ĉu ne estas pli de kiam ni —.

Ŝi skuis la kapon.

— Maltrafan pafon, ŝi diris per tiu sarkasma akcento, kiu ĉiam konfuzigas min.

— Do tamen estas via naskiĝtago! Vi ne intencas diri, ke mi forgesis — — tion mi neniam povas pardoni al mi! Mi senprokraste eliros provante havigi skatolon da sukeraĵo kaj

50-a Universala Kongreso de Esperanto

Tokio 31/7 — 7/8 1964

Sub la Alta Protektado de D-ro Yuji Shibata,
Prezidanto de la Japana Akademio

INFANA KONGRESETO

Ankaŭ la 50a UK havos sian Infanan Kongreseton. La aliĝkoto ne estas ankoraŭ definitive fiksita; ĝi estos proksimume kiel la lastjaraj.

KOTIZOJ

Ni ankoraŭfoje atentigas ke la kotizoj validaj por la 50-a UK estas nur tiuj presitaj sur flavaj aliĝiloj. La kotizoj presitaj sur bluj aliĝiloj estas eraraj kaj sekve nevalidaj.

LOĜIGA SERVO

La Loĝiga Servo de la 50-a UK rezervas litojn nur por individuaj aliĝintoj. Organizantoj de karavanoj devos rezervi la litojn pere de normala vojaĝagentejo. Por akompan-

— kaj kelkajn florojn! Kie oni povas aĉeti florojn je ĉi tiu tempo de...

Ŝi min interrompis.

— Estas mia naskiĝtago la 21-a de januaro, ŝi konstatis.

Ekrigardinte rapide la verdajn arbojn en la ĝardeno, mi kapitulaciis.

— Bone, mi diris, ŝarĝita de pekoj, — mi kapitulacias! Kio estas tio, kion ni festas?

— Jubileon!

— Jes, kompreneble. Nu, kiam vi tion diras... hm! ... tio estas... kiu jubileo?

Ankoraŭfoje ŝi provis kapti mian rigardon kaj ĝin firme teni. Jen ŝi diris, malrapide kaj distinkte:

— Hodiaŭ jam estas precize kvin jaroj, de kiam mi ekhavis novan robon.

Trad.: Rudolf Dreyer

antoj de kongresano — edz(in)o aŭ alia familiano — kiuj ne estas aliĝintaj al la kongreso, la Loĝiga Servo ne rezervas litojn.

T.E.J.O.-KONGRESO

La 21a Internacia Junulara Kongreso okazos en Ootu (Kioto) de la 8-a ĝis la 15-a de aŭg. 1965. La kotizoj ĝis 1/4-65 estas: malpli ol 20-jaraj: 63,— ned.gld.; pli ol 20-jaraj: 70 ned.gld. Detalaj informoj kaj aliĝiloj riceveblaj ĉe 21-a IJK, Kansai Esperanto-Renmei, 3—10 Nakatu-Hamadori, Ooyodo-ku, Osaka, Japanujo.

EŬROPA KONFERENCO

Sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio okazos en Vieno, de la 11-a ĝis la 17-a de julio 1965, Eŭropa Esperanto-Konferenco.

La aliĝkotoj por konferencano, edz(in)o kaj junulo estas resp. 80,—, 75,— kaj 70,— ned.gld. (ĝis 1.1 1965). La kotizoj inkluzivas la tutan programon de la Konferenco kun la ekskursoj kaj kun la tag- kaj vespermanĝoj dum la ekskursoj mem. — Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas manĝoj dum la ekskursoj mem. — Driceveblaj ĉe Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16, Wien XV.

STATISTIKO

(ĝis 15/10 1964) Argentino 4, Aŭstralio 19, Aŭstrujo 7, Bahamaj Ins. 2, Belgujo 7, Brazilo 9, Britujo 41, Bulgarujo 11, C.A.R. 1, Ĉeĥoslovakujo 1, Danlando 13, Finnlando 4, Francujo 66, Germanujo 37, Hindujo 1, Hispanujo 6, Hong-Kongo 2, Hungarujo 5, Irlando 1, Israelo 2, Italujo 21, Japanujo 15, Jugoslavio 10, Kanado 2, Maroko 2, Meksikio 1, Monako 2, Nederlando 29, Norvegujo 6, Nov-Zelando 5, Pollando 10, Rumanujo 1, Svedujo 36, Svisujo 9, U. A. R. 1, Urugvajo 3, Usono 26, Venezuelo 3. Entute 421 el 38 landoj (pasintjare 563 el 27 landoj).

RECENZOJ

Religiaj

Neelmezurebla, ni laŭdegas vin. 34-paĝa preĝlibreto «por ĉiuj kristanoj en la spirito de la Ĥrisostomoliturgio». Eldonis Thomas-eldonejo, Zürich. Prezo: DM 1.80.

Bela libreto, en arterfarita ledokuntra surpreso, mole bindita. Presita teksto en nigra kaj ruĝa koloroj. Preĝlibreto por ĉiuj kristanoj.

Bedaŭrinda fakto ja estas, ke la kristanaro estas disigita laŭ eklezioj, kaj ĉiu pledas por sia vidpunkto. Ĉu eblas eldoni preĝlibron por ĉiuj celoj kaj ĉiuj kristanoj?

La fonto de la libro ne estas indikita, sed la «Imprimatur» de Vicarius Generalis Rhode indikas al la katolikismo. Ni do povas atendi ion pri Maria — kaj jes: Tri linioj sur paĝo 7 kun «laŭdo al la patrino de Kristo». Sed tiel verkita, ke neniu protestanto povas trovi ĝin kontraŭkonscienca.

Kaj la eŭkaristio? Jes, kaj jen pli grava, ĉar la tuta preĝo reflektigas la katolikan koncepton, ke la eŭkaristio estas la ripetita ofero de Kristo, kiun ni oferas al Dio.

Ekster tio, la libro vere estas taŭga al kristano el kiu ajn konfeco. Kaj ĉar la vojo de la preĝo estas tiel ŝpare uzata, ni devas kun ĝojo saluti tian libron en nia lingvo.

Haro

H. A. de Hoog: «Nia historio». Eldonis KELI 1964. 160-paĝa, broŝ. (18 steloj) aŭ bindita (22 steloj).

Okaze de la 50-jara jubileo la nederlanda Keli-ano de Hoog verkis artikolojn en «Dia Regno» pri la historio de la kristana esperanto-movado. Nun tiuj artikoloj aperis en libroformo, kaj jen ni havas libron tiel bone verkitan, ke la enhavo kaptas kaj tenas la intereson ĝis lasta paĝo.

Dum siaj esploroj de Hoog unue trovis malfacilaĵojn, ĉar en skriba formo troviĝis malmultaj fontoj. Keli — li diras — similis al planto kies tigo rompiĝis, tiel ke oni ne plu povas trovi la radikon. Sed li fosadis tiom ke li trovis eĉ radikojn en la tempo antaŭ la fondiĝo, — jam en 1906 la eta komenco pere de Hübner, nuna honora prezidanto de Keli, troviĝis.

Al ni esperantistoj estas kaj vundige kaj instrue legi, kiel la kristana esperanto-movado kelkfoje atingis preskaŭ al nemezureblaj venkoj — sed la nesubteno de la ordinaraj membroj detruis la bone planitan kaj organizitan laboron de la gvidantoj. Al ni norvegoj eble decas pripensi, ke la unua norvega esperanto-gazeto, «Norvega junularo», eldoniĝis per tiu iniciato de la kristana movado per Christian Endeavour.

Haro

Vivo de Privat

Edmond Privat: Aventuroj de pioniro. Eld.: STAFETO, La Laguno. Beletraj kajeroj n.ro 17. 1963. 144 paĝoj.

Edmond Privat siatempe verkis sian konatan *Vivon de Zamenhof*. Aperis jen — ankaŭ el la plumo de Privat — ia *Vivo de Privat*. La libro ne estis preta ĉe la morto de la aŭtoro en 1962, kaj Henri Vatré tre delikate zorgis pri la pretigo. Tiel oni povis ankaŭ doni al la libro titolon, kiun ĝi meritas. Ĉar Privat vere estis pioniro, kaj li interese rakontas pri sia vivo kaj sia esperantisteco en tre mallongaj ĉapitroj, tiel mallongaj kaj tiel lingve klaraj, ke ili devas senti eĉ novulon al legado. Li rakontas i.a. pri siaj renkontoj kun prezidento Theodore Roosevelt — de kiu li petis aŭdiencon kiel 18-jarulo — Romain Rolland, Fridtjof Nansen, Gandhi kaj Nehru, kaj multaj aliaj interesaj personoj. Li ankaŭ tre interese rakontas

pri kongresoj kaj vojaĝoj kaj fervora agado por Esperanto.

Tiun libron devus posedi ĉiu Esperanta klubo kaj la biblioteko de ĉiu esperantisto. Tion meritas Edmond Privat.

JHR.

La novaj vestoj de la fabeloj

La novaj vestoj de la Imperiestro kaj du aliaj fabeloj de H. C. Andersen. Ilustr. de Gustav Hjortlund. Eld.: KOKO, Kopenhago, 1964.

En granda formato kaj kun plej grandioze amuzaj ilustraĵoj prezentigas al ni tri fabeloj de H. C. Andersen — en vere novaj vestoj. Temas pri la tri fabeloj, kiujn konas ĉiu norvego sub la nomoj «Keiserens nye klær», «Kloss-Hans», «Det er ganske visst». Pri la fabeloj mem nenion novan. Sed la ilustraĵoj meritas ĉies atenton kaj laŭdon, klaraj kaj okulfrapaj kaj kolororiĉaj ili estas frandaĵo por plenkreskuloj same kiel por infanoj. Ankaŭ la traduko de Ib Schleicher — kontrolita de D.ro Paul Neergaard kaj la Literatura Komitato de SAT — estas tre bona. Se oni volas trovi ion por kritiki, oni serĉu — kaj se oni serĉas, oni trovas bagatelaĵojn: Foje komo anstataŭ dupunktoj antaŭ rekta parolo, kaj foje minusklo anstataŭ majusklo en la komenco de rekta parolo. Sed kio estas tio? La libro estas senmakula.

JHR.

Belega fotolibreto pri Nederlando

Kees Scherer kaj Jaap Romiju: Nederlando, la unua kolorbilda fotolibreto en serio «La mondo en Koloroj». Eld. A. W. Bruna & Zoon, Utrecht, 1964. 104 p. broŝ. Prezo: 14 steloj.

Ni tuj diru, ke se la aperontaj libroj en ĉi tiu serio estos same belaj kiel ĉi tiu unua, la sukceso devos esti

certa, — kaj la serio havos grandegan propagandan valoron — por Esperanto.

La 64 koloraj fotoj de Scherer majstre prezentas al ni la ĉarman Nederlandon, jen per pejzaĝo, jen per urbobildo, foje per trankvila angulo de kanalo aŭ herbejo, foje per vivoplena momento de popola vivo, — kaj ĉio estas akre observita, delikate elektita, kun kompreno pri la efeko de helaj kaj malhelaj koloroj, kiu devas supozigi, ke la fotografinto multon lernis de sia samlandano Rembrandt.

La teksto de Romiju, trideko da paĝoj kun disemitaĵoj nigra-blankaj fotoj, mallonge informas pri la historio, pri la lando kaj la urboj, kaj pri la homoj de Nederlando.

La libro ĝojigas ĉiun, kiu vizitis Nederlandon, — kaj donas emon al vizito en Nederlando al tiu, kiu ankoraŭ ne estis tie.

JHR.

Faktoj pri Islando

Iom post iom la landoj aperigas libretojn kiuj enhavas faktojn sciindaĵojn. Ni jam havas Faktojn pri Norvegujo kaj Danlando kaj Pollando — kaj jen la Faktoj pri Islando, eldonitaj de Bókaútgáfa Menningarsjods, Revkiavik. Plaĉa libreto kun multaj bildoj kaj kun informoj i. a. pri geografio, historio, administrado, industrio, fiŝkaptado, linvo kaj kulturo, scienco kaj arto. Tre utila libro.

R.

Tri belegaj turistbroŝuroj

El Bruselo venas du novaj turistbroŝuroj, unu nigra-blanka, kun belegaj fotoj kaj malmulte da teksto, la alia kun koloraj bildoj, ankaŭ tre bela kaj kun malmulte da teksto. La broŝurojn oni petu ĉe Informa Centro de Bruselo, 10 rue du Chêne, Bruxelles 1, Belgujo.

«Antverpeno atendas vin» nomiĝas pli granda broŝuro, kiu komenciĝas per la vortoj «Saluton al vi, esperantisto!» Belaj bildoj, interesa teksto. Eldonis la urbo Antverpeno. Petu ĉe La urbo servo por turismo, Pelikaanstraat 6, Anvers, Belgujo.

JHR.

Infana bildteatro

«Ora fiŝo», bildteatro por infanoj de la mondo. 10 kolorigitaj afiŝoj kun teksto sur la malantaŭa flanko. Eldonis Amo-Akademio en Tokio.

Jen facila esperantolegaĵo por infanoj en malofta formo. La intenco estas ke la «instruisto» montru la afiŝetojn unu post la alia, dirante la tekston, tiel la infanoj bone komprenos la rakonton eĉ se ili ne rekonas ĉiujn vortojn. La fabelo temas pri fiŝkaptisto kiu neniam povis esti kontenta kaj tio fine kondukas al ruino. Temo bone konata kaj atentinda!

(Prezo proks. kr. 4.)

EIna Matland

Du belegaj ĉinaj albumoj

Moderna Pekino. Kompilata de la Oficejo por planado de Urba Konstruado de Pekino. Eld.: Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 112 p.

El Ĉina Fotografia Arto. Kompilata de la Redakcio de «Ĉina Fotografio». Eld.: Ĉina Eŝperanto-Ligo, Pekino, 1963. 112 p.

La papero bedaŭrinde ne estas la plej altkvalita — kvankam neniel malbona ĝi tamen ne estas digna de la bildoj presitaj sur ĝi. Tio efektive estas la sola kritiko kontraŭ la du albumoj, kritiko, kiu celas substreki la valoron de la bildoj, samtempe akcentante, ke oni malvaru taŭgan paperon nor tiaj eldonaĵoj.

Ambaŭ libroj per fotoj — nur kelk-

aj en koloroj, la plejmulto nigraj-blankaj — prezentas al ni aspektojn de la grandega orienta lando, ambaŭ libroj estas tre plaĉaj, kaj oni ĝuas ilin trafolumi. Komprenoble tiu pri la urbo Pekino estas pli malvasta koncerne temojn; same komprenoble tiu pri fotografia arto donas pli da okulĝuo — sed ili estas ambaŭ tre belaj, kaj meritas elstaran lokon en la Esperantoliteratura librobretaro.

Mond.

Ankoraŭ ĉina libreto

«Kiel Lu Ban majstriĝis.» Libreto eldonita de Ĉina Esperanto Ligo.

Versajne Lu Ban estas persono en la ĉinaj fabeloj kiel Askeladden en la norvegaj. La libro rakontas pri lia daŭra laboro por esti ĉarpentisto, li ne ĉesas perfektigi antaŭ ol li estos fariĝinta la plej genia ĉarpentisto de la mondo. Malfacilaĵoj ne ekzistas por li, li ĉiam konkeras ilin.

La libro estas facila legaĵo, kaj certe bone konvenas por komencantoj plenkreskaj kaj por infanoj. — Belaj, kolorriĉaj desegnaĵoj ornamas ĉiujn paĝojn.

EIna Matland

Ĉinaj

Rakontoj pri fantom-spitantoj. Kompilata de la literatura instituto de la ĉina akademio de sciencoj. Eldonis Ĉina Esperanto-Ligo 1961. 98-paĝa, broŝurita, riĉe ilustrita.

La libro enhavas 34 novelojn el la malnova ĉina literaturo, kelkaj jam anonimaj, kaj el la plej diversaj epokoj de la tempo. Ekzemple unu estas verkita ĉ. 200 post Kristo, aliaj el la King-dinasto, kiu daŭris 1636—1911! Tiuj «fantom-spitantoj» ofte similas al niaj propraj herooj en la popolo-fabeloj, tiuj, kiuj ne timis la trolojn, sed tute kontraŭe uzis sian tutan ruzon por venki ilin.

Oni tiel havas plaĉan legaĵon, iom naivan, kelkfoje vere instruon pri la fremdaj kondiĉoj de la aŭtoroj. Kaj la libro estas valora por la interkompreniĝo inter oriento kaj okcidento.

Sed bedaŭrinde la eldonantoj ne povas ne doni al la libro politikan karakteron. En 18-paĝa enkonduko la eldonantoj klarigas, ke

«Nia celo en kompilado de ĉi tiu broŝuro ne estas montri la materiismajn ideojn de antikva Ĉinio pere de tiuj rakontoj. Ĉefe ni prezentas tiujn rakontojn kiel fablojn, kiel alegoriajn rakontojn... Se oni estas timema... oni timos ankaŭ la ne ekzistantajn fantomojn aŭ diojn. Sed kun levado de politika konscio, forigo de superstiĉo kaj liberigo de penso, oni trovos, ke ne nur timindaj estas fantomoj kaj dioj, sed ankaŭ imperiismo, reakciuloj, reviziismo»

Kaj jen sekvas laŭdo de Maŭ Zedong, atakoj al Usono, Tito-kliko de Jugoslavio ktp.

Do — la libro donas plaĉan rigardon al la antikva Ĉinujo, kaj trudan politikan rigardon al la nuna.

HAR

*

«La origino kaj disvolviĝo de la malakordoj inter la gvidantoj de KPSU kaj ni». «La gvidantoj de KPSU estas la plej grandaj splitistoj de nia tempo».

Pere de tiuj du broŝuroj la «Fremdlingva Eldonejo» en Pekingo nun atingis 21 sep komentojn pri «malferma letero de la Centra Komitato de KPSU». Pure politikaj, arbitre komunismaj tiuj celas klarigi la disigiĝon de la komunisma mondo. En ĉi tiuj tagoj, kiam ni ĵus aŭdis pri la falo de Hruŝĉov, la pamfletoj havas aktualan intereson.

HAR

Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965

sub aŭspicioj de UEA kaj AEF

VIENO — AŬSTRUJO

11/7 — 17/7 1965

PROVIZORA PROGRAMO

La «Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965» komenciĝos la 11-an de julio kaj fermiĝos la 17-an de julio 1965. La konferenca akceptejo jam funkcias la 10-an de julio.

DEVIZO: Esperanto en la praktikon!

Konferencaj temoj:

1. Esperanto en komerco kaj industrio.
2. Esperanto en turismo.
3. Lingvaj problemoj en la internacia politiko.

Dimanĉo, 11/7: Akceptado, Balo.

Lundo, 12/7: Inaŭguro.

Mardo, 13/7: Tuttaga aŭtobusa ekskurso.

Merkredo, 14/7: Laborkunsidoj, Urbvizitoj.

Ĵaŭdo, 15/7: Tuttaga ŝipekskurso.

Vendredo, 16/7: Laborkunsidoj, Vizito de Grinzing

Sabato, 17/7: Vizito de Schönbrunn Adiaŭa Vespero.

Postkonferenca ekskurso (18/7-25/7) tra Aŭstrujo per aŭtobusoj de Vieno — Graz — Klagenfurt — Wörthersee (lago de Wörth) — Grossglockner — Zell/See — Salzburg — Linz — Vieno (8 tagoj, kompleta aranĝo proksimume 160,— n.gld.).

Partoprenantoj de la 49a UK vizitu oficialan giĉeton de la Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965 en la akceptejo.

SE . . .

Respondoj al la 16 demandoj

1. Floron.
2. En Islando.
3. Surtere (*Eskadrono* estas parto de kavaleria regimento, *eskadro* estas militŝiparo).
4. Insekto (insekta okulo konsistas el ĝis 25 000 facetaj okuloj).
5. Manĝi ĝin — ĝi estas dolĉsuka.
6. Ekz. de pumpilo (la cilindro, kiu moviĝas interne de la tubo, puŝante la fluidaĵon).
7. En Amsterdamo.
8. Kuŝi en la lito.
9. En Benares.
10. Neniu.
11. Li kartludas.
12. Al Lhasa (3600 m) kaj Jeriko (400 m *sub* la marnivelo).
13. Fiksas pordon aŭ fenestron per ilo ŝovebla en truon.
14. Pluto.
15. Kunigas du metalpecojn per fandebla miksaĵo (stano).
16. Tujan forĵeton aŭ mortigon.

La konkurso en nr.o 7

Multaj legantoj sendis al la redakcio la ĝustan solvon de la konkurso, kaj ĉiuj solvintoj ricevos premion!

Oni facile konjektis, ke la nombroj estas jaroj, kaj jaroj en la Esperantomovado gravaj. Kial ne ekzameni la jarojn de la Universalaj Kongresoj? Jen la solvo:

1958 Mainz, 1952 Oslo, 1923 Nürnberg, 1965 Tokio, 1926 Edinburgh, 1937 Varsovio, 1908 Dresden, 1926 Edinburgh, 1930 Oxford. La kometliteroj fariĝas MONTEVIDEO. Mankas unu litero, kies ŝlosilo estis: Antaŭnomo de la ĉefpersono de la konkursa solvo. — Ĉar la konkursa solvo evidente estas

Montevideo, kaj la ĉefpersono tie estis profesoro Lapenna, la kometlitero de lia antaŭnomo Ivo kompreneble kompletigas la vorton.

Ni dankas pro la intereso, kaj jen:

Nova Konkurso

En la zoologia ĝardeno

La nova helpanto en la zoologia ĝardeno devis meti novajn nomŝildojn sur la restadejojn de ĉiuj bestoj. La nomŝildoj troviĝis en skatoloj. Li volis komenci per la karnomanĝantoj. Sed ekprenante la koncernan skatolon, li bedaŭrinde renversis planken kelkajn skatolojn, tiel ke la nomŝildoj ĥaose disiĝis. Li metis ilin en la skatolojn, ne atentante, ke la ŝildoj estu en la ĝustaj skatoloj. La postan tagon la vizitantoj de la zoologia ĝardeno povis en la parto, kiu enhavas la karnomanĝantojn, trovi jenajn bestnomojn: Tigro, leono, linko, impalo, genoto, elando, kaprelo, puma, jaguaro, servalo, cervo, ŝakalo, dingo, apro, ibekso, talpo, mandrilo, hieno, melo, leopardo, gibono.

Kiu el tiuj bestnomoj ne apartenis en la skatolo de karnomanĝantaj bestoj?


Solvojn bonvolu sendi al la redakcio antaŭ la 1-a de februaro 1965.

Korespondu!

Pli ol 30 geknaboj 11—15-jaraj dez. kor. kaj interŝanĝi bildkartojn kun samaĝuloj el la tuta mondo. — Nia adreso: Esperanto-Grupo de Kállai Éva, út. Töröház, Békéscsaba, Hungarujo.

18-jara lernantino de ekonomia teĥnikumo deziras korespondi kun esperantisto el fama Norvegujo. Fino Elena Toneva, str. G. Dimitrov 26, Parvomaĵ, Bulgarujo.

KRUCVORTENIGMO



Horizontale:

1. Aviadilo
8. Efika
15. Sola en sia speco
16. Insulo inter Japanujo kaj Taivano
18. Poemaro Esperanta
20. Parto de beltorsulo
21. Frikativoj
22. Apertureto
23. Sufikso
24. Paro
25. Malgranda muzika teatraĵeto
28. Faru venton!
31. Duona ĉefurbo
32. Renversita sufikso (neoficiala)
34. Zamenhof
36. Kalcioksido
38. Urbo en Tunizio
39. Sciigoj
41. Plej granda parto de epoko
42. Apudstrata
45. Ridindiga
46. Konsonantoj
47. Besto sen komenco kaj fino ..
48. Karakteriza por la gotiko
50. Sin movi
52. Karŝat'
54. Pecetigi grenon
56. Esprimo de estra volo sen komenco kaj fino
57. Esto
60. Unu el du egalaj partoj de ĉokoladfrukto
61. Malvendo
63. Forta inklino
64. — kun substantiva numeralo estas jararo
65. Inversan ideolvon
67. Numeralo
68. Du voĉoj donantaj samtempe la saman sonon
71. Malorda apuddoma spac'
72. Greka litero
74. Post komparativo
75. Pronomo
76. Greka litero
77. Instrumento
80. Prefikso
81. Numeralo
83. Dangesignalo
84. Sufikso
85. Maldolĉega
86. Mondparto

Vertikale:

1. Poeto (Esperanta)
2. Tre fervoraj personoj
3. En Sud-Ameriko
4. Mineralo, farbo
5. Nenecesa libreto en Skandinavio
6. Rakont'
7. Numeralo
8. Sufikso
9. Fari malbonon
10. Akvo kun interna malordo
11. Ornama stilo
12. Konjunkcio
13. Amase
14. Akregustaj vegetaĵoj
17. Moviĝos
19. Sufikso
21. — eno, frua plej malsupra geologia etaĝo de la terciara epoko
26. Komenci la transporton
27. Renversita pridiskutita vortero
29. Konata fizika fenomeno, precipe somere
30. Arbo
33. Densigita stato de oksigen'
35. Homoj en Aŭstrujo kaj Italujo
37. Birdo
38. Plaĉa al la okuloj
40. Tempunuo
43. Stango inter ĉevalo kaj veturilo
44. Numeralo
49. Homa son'
51. Arkipelago
53. Neoficiala sufikso
55. Entuziasmega
56. Konsonantoj
58. Per sperto scii
59. Korelativa vorto
61. Monat'
62. Kred' pri realiĝo de deziro
66. Komenc' de rapida malleviĝo
67. Adverbo
69. Participa finaĵo adjektiva
70. Malsud'
73. En—, malfacile komprenebla
75. Araba nomparto
78. Prepozicio
79. Renversita komenco de la bestscienco
82. Korelativa vorto

Solvojn bonvolu sendi al la redakcio antaŭ la 15-a de februaro 1965.

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

Klubo Esperantista en Oslo.

3/9. La prezidanto John Berggreen bonvenigis la ĉeestantojn al la nova klubsezono. La ĉefpunkto de la programo estis prelego de Ludvig Anjer: «Impresoj pri la 49a Universala Kongreso» en Hago. Li rakontis pri sia partopreno en la vojaĝo kune kun la karavano de gesinjoroj Nielsen el Fredericia, la antaŭkongreso en Bruselo, la postkongreso en Leeuwarden kaj la Kongreso en Hago.

La prezidanto dankis pro la interesa kaj multenhava prelego kiu donis al la ĉeestantoj bonan kaj ampleksan impreson de la diversaj okazintaĵoj.

Post la kantado de «Esperanto, nia suno» Aslaug Refsing rakontis «Pri Helsingoro 1964».

21/9. La prez. bonvenigis la ĉeestantojn kaj donis jenajn informojn:

Nia klubo estas invitita al kunveno de Norsk Oppfinnerforening jaŭdon la 24/9 en Ingeniørenes Hus. La temo de la kunveno estos jena: «En universell oppfinnelse — det internasjonale språk Esperanto» kun 2 prelegoj: «Kaos eller språklig forståelse» de John Berggreen kaj «En genial løsning — historikk og konstruksjon» de Støp-Bowitz.

La unua punkto de la programo estis prelego de Otto Koren: «Kiel ni fariĝis kaj kial mi estas esperantisto». Ĉar la aliaj fremdlandaj lingvoj havas tro da malfacilaĵoj pro tro da esceptoj li trovis ke Esperanto havas la avantaĝon doni pli grandan rentumon ol la lernadon de aliaj lingvoj.

La dua programpunkto estis prelego de Thor Magnus Carlsen: «Pensoj pri propaganda laboro.» Ĉar Thor Magnus Carlsen estas forvojaĝinta pro ferio, la prezidanto legis lian manu-

skripton. En ĝi nia propagandestro donis tre fundan resumon de la diversaj flankoj de la propaganda laboro: Interna, ekstera kaj eksterlanda, ekonomio kaj praktikaj problemoj. La prelego estis tre interesa kaj ideoriĉa, kaj la prezidanto proponis ke oni diskutu la enhavon je pli malfrua okazo.

Fine Rolf Bugge-Paulsen asistita de Gerd Jæger-Pettersen kaj Einar Gustavsen dum «10-minuta lingva instruado» klarigis pri la uzo de la sufiksoj «ig» kaj «iĝ».

1/10. La prez. bonvenigis la ĉeestantojn kaj referis dankon de Arnfinn Jensson pro la donaco je lia 50-jara naskiĝtago. Plie li informis: La klubo sendis gratulan festtelegramon al Johan Falkberget okaze de lia 85-jara naskiĝtago; al la nova esperantokurso aliĝis entute 17 personoj; la K.K.K. de la Nordlanda Kongreso en Oslo 1965 kiu konsistas el John Berggreen (prezidanto), Kjell Gustavsen, Astrid Mansrud, Alfr. Skyberg kaj C. Støp-Bowitz, ellaboris provizoran laborplanon kaj programon, kaj li donis resumon de ili. Oni kantis la Kluban Marŝon, akompanata per piano de Aslaug Refsing.

Kiel unuan punkton de la programo Kultura Vespero, Astrid Mansrud legis kortuŝan poemon *Amo al patrino*.

La ĉefpunkto de la programo estis prelego de Gunleik Bergrud pri «La norvega popolmuziko» kun demonstracio. Komence li per sonbendo ludis sian propran kompozicion «Hejmecan fantazio». Li donis ekzemplojn de popolmuzikinstrumentoj, popolkantoj k. s. Fine li per piano ludis la kompozicion «Fenta» (La Vagolino). La ĉeestantoj ĝuis la bonan prelegon kaj belan muzikon kiu vere meritis la fortan aplaŭdon kiun ĝi ricevis. Gunleik Bergrud tiel bone kaj bele ludis la pianon ke ni esperas ke li ankaŭ estonte ludos por ni.

C. Støp-Bowitz donis plurajn informojn kaj legis cirkuleron de NEL. Interalie li memorigis pri la subskribo kolekto okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro (1965). La blankedoj estos haveblaj antaŭ nelonge. — La kanthoro de la klubo kiu konsistas el Nanna Fridrichsen, Gerd Jæger Pettersen, Aslaug Refsing, Grethe Westmark kaj Brynhild Østmo (gvidanto) kantis novan viglan kanton «Vizitante Regensburgon». — La Teatra Grupo montris skeĉon: «Muta filmo». Brynhild Østmo reĝisoris kaj tre bone ludis Gerd Jæger Pettersen, Thor Magnus Carlsen, Aslaug Refsing, Otto Koren k. Einar Gustavsen. La amuza skeĉo (pantomima) rikoltis fortan kaj merititan aplaŭdon.

La prez. informis ke Aslaug Refsing donacis al la klubo belan Hardangerbroditan kafotukon, Rudolf Dreyer donacis 2 skatolojn da cigaroj por lotumado.

19/10. La prez. malfermis la kunvenon kaj bonvensalutis nian gaston Didrik Mjølhus el Skudeneshavn. Laŭ propono de la prezidanto oni decidis sendi gratulsaluton al la Esperantoklubo de Bergen okaze de ĝia 30-jara jubileo 29/10.

La ĉefpunkto de la programo estis prelego de Kirsten Ek pri «Interesaj homoj kiujn mi renkontis». Ŝi rememoris rektoron Johan Hertzberg — faman kaj eminentan pedagogon, kaj lian personan interrilaton kun la lernantoj. Li estis unu el la plej grandaj personecoj kiujn ŝi renkontis. Plie ŝi rakontis pri siaj travivaĵoj kiel flegistino ĉe Ullevål Malsanulejo dum la milito, interalie la renkonto kun «La Flava Fromaĝo» kaj diversaj «subteraj» laboristoj kiuj trovis intertempan rifuĝejon en Ullevål kie ĉiuj estis egalaj kamaradoj sen demando pri stato aŭ profesio en la socio. La interesa kaj bona prelego rikoltis fortan, merititan aplaŭdon.

La Kluba Horo instruis al ni alian novan kanton «Tiritomba».

R. Bugge-Paulsen «Priparolas novajn esp.librojn». Li montris al ni la tutan enhavon de la Kongresa Dokumentaro kaj multajn poŝtkartojn, fotojn, librojn, muzikaĵojn k.t.p., kiujn li aĉetis aŭ donacricevis dum sia restado en Hago. Li menciis ke li kolektis la diversajn esperantaĵojn por montri la evoluon de Esperanto dum venonta ekspozicio. La prezidanto dankis lin pro la tre interesa kaj riĉenhava parolado.

Fine C. Støp-Bowitz, kiu estras la sekcion de prononcado en la Akademio de Esperanto, dum «10-minuta lingva instruado» instruis nin pri la korekta prononcado de diversaj esp.-literoj. Interalie li demonstraciis la diverslandajn elparolojn ekz. angla, franca, dana kaj norvega. — Li tre sukcesis. — Inger Richard kunportis florojn el sia ĝardeno por ornamo de la tabloj.

La Urso, Sarpsborg,

kunvenis 8/10. Gunnar Bergby, juna gimnaziano, interese rakontis pri la granda vojaĝo tra multaj eŭropaj landoj, kiun li pasintsomere faris, kune kun kelkaj aliaj junuloj, en la aŭto de Arnljot Kyllingstad. Ni ĉiuj ĝuis lian fervoron kaj entuziasmon, kaj konstatis, ke tia vojaĝo povas esti bona instigilo por junuloj.

22/10. Pro vizito de gimnazianoj la unua parto de la klubvespero estis prezentado de la Esperantaj gramatiko kaj vortfarado. Johan Hammond Rosbach montris lumbildojn kaj rakontis pri vojaĝo tra Lihtenŝtejno, Svisujo, Italujo kaj Monako. — Kiel kutime estis ankaŭ librokroniko kaj ellotado laŭ bildkartoj.

«Mara Vento», Haugesund.

10/9. La prez. bonvenigis la relative multajn ĉeestantojn al nova labor-

Helsingør kaj la mondkongreson en Haag. Montriĝis ke ilia lerteco pliboniĝis post la partopreno ĉe la aranĝoj, kaj ili fluante respondis kaj rakontis pri siaj travivaĵoj eksterlande.

sezono esperante ke ĝi estu agadplena kaj prospera. — Apartan saluton li direktis al nia marista samideano A. Alne kiu denove estis en nia rondo post longa foresto surmare.

Programulo estis Johs. Sortland kiu prezentis belajn, plaĉajn kolor-lumbildojn pri la ĉi-jara kongres-vojaĝo tra Danlando, Germanio kaj Nederlando al la kongresurbo Hago kun antaŭurbo Scheveningen ĉe la Norda Maro. La bildoj rememorigis pri belaj suntagoj en la pitoreska, romantika Rejna valo kiel en simpatia Nederlando kaj frata gastama Danlando. La bild-prezenton li akompanis per rakontado pri la travivaĵoj dumvoje kaj impresoj kaptitaj. Al li aparte impresis krom la Rejn-valo la pitoreska urbo Ribe en ĉarma regiono dana kun majestaj cikonioj sur la tegmentoj kaj plaĉ-aspektaj domoj malnovstilaj. La programulo estis danke aplaŭdata.

S-ano S. Ege donacis al la klubo plaĉan pupan paron, nacikostume vestitan por ke ni ĝin ellotadu. La kunvenantaro kun danko akceptis la tre bonvenan donacon.

Estis preparolata la studlaboro.

La Esperantoklubo de Bergen

kunvenis la 10/9. — La prez. Agnes Hennemann bonvensalutis kaj esperis bonan sezonan laboron.

Ges-roj J. J. Jahren vojaĝis al la Mondkongreso en Haag, kaj s-ino Jahren parolis pri la kongresaj aranĝoj kiujn ili partoprenis, kaj la travivaĵoj tiurilate. Per lumbildoj faritaj dum la veturado. Ŝi montris belajn pejzaĝojn.

Kjell Offerdal intervjuis la geklubanojn kiuj partoprenis esperantajn aranĝojn ĉisomere i. a. la kursojn en

24/9. Kjell Offerdal parolis pri diversaj vojaĝmanieroj kaj pri siaj travivaĵoj dum karavanvojaĝo kiun li gvidis tra eŭropaj landoj. Li menciis la multspecajn devojn faritajn de la gvidanto por ke la partoprenantoj ekhavu plej bonan plezuron kaj bonfarton dum la feria vojaĝo.

8/10. S-ro Hans Lunder montris belajn kolorbildojn de siaj restaĵoj en Germanujo kaj Hispanujo. Li komentariis vigle la bildkolekton. Kjell Offerdal prezentis esp. taskon «Novelo finota». Li mem faris la kometcon de la noveleto, kaj finis ĉe la ekscita momento, kiam . . . 3 grupoj daŭrigis la noveleton, kaj ni atingis tre amuzajn finaĵojn. Bona esperanta praktikado.

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/s (Eldonejo Esperanto A/s)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Ĉefdelegito de U. E. A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
C. E. Holters vei 7 C, Sarpsborg: - Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.
Telefono: 54 72 7